BELGA CENTRA KOMITATO ESPERANTISTA
++

2-a kunsido -lo.7.54-
en " De Witte Leeuw" Antwerpen
==========

PREZIDIS : Dro KEMPENEERS
Ceestis : Sroj Debrouwere, Jaumotte, Maertens, Sielens & Van Ginder
taelen.

1. MALFERMO : Post la bonvenigo fare de la Prezidanto, la protokola sekretario estas petata laûtlegi la protokolon de la antaùa kunveno.

2. PROTOKOLO

3. Demandoj rilate la enhavon de la protokolo:

Beneluksa kongreso : la Prezidanto komunikas ke restas profito de cirkaù 2000 F

Unesko kunsido : la prezidanto konstatas ke la opinio-sonde fare ne okazis pro forgeso de Sro Sielens.

BEFA : La prezidanto ne ankoraù skribis al Sro Debruyne, sed li faros, ĉu persone ĉu skribe.
Fine ni konstatas ke la sinteno de Sro Pilloy momente ne estas komprenebla, ĉar li ne respondis al leteroj rilate la kunlaboron de la gazetara servo. Sro Kempeneers alskribos lin denove.

4. KONGRESO EN HAARLEM
La registaro verŝajne aficiale delegos Sron Dron Van Gindertaelen por reprezenti la Ministron ĉe la UK en Haarlem; al Sro Kempeneer kiu insistis por ke oni sendu ĉi-foje ne-esperantistan delegiton, oni respondis ke , pro la raporto, estas pli bone ke iu Esperanti reprezentas la registaron, ĉar li certe favore raportos.
Koncerne la Unesko - kunsido en Montevideo, Sro Kempeneers vizitis Sron Verniers en la ministerio, kiu klarigis ke la Belga registaro ne povis akcepti la enkondukon de Esperanto en la lernejoj, pro la fakto ke la programo jam estas tro ŝargita.
Sro Kempeneers komunikas ke li jam tranedonis la rezolucion al la Belga registaro kaj sendis kopion al L.E.E.N kaj al Luksemburgo.
Sro Kempeneers insistas por ke la ligoj sendu delegiton al la kunveno de la informa fako en Haarlem.

5. BENELUKSA KONGRESO EN LIEĜO
Sroj Jaumotte , Maertens kaj Van Gindertaelen priparolas diversajn erojn de la kongreso kiuj estonte devas esti pli ellaboritaj, ekz la balon, la varietean vesperon. Sro Sielens proponas por kunmeti

skemon laŭ kiu agu la estontaj LKK.

6. ESTONTA AGADO

a. Ni ne forlasas la ideon de la opinio-sondo, sed Sro Jaumotte pledas por forsendi leterojn(anstataŭ cirkuleroj) komence de la monato septembro. Sro Maertens petos kopion de la nederlanda teksto al LMEN kaj sendos ĝin poste al Sro Sielens kiu eventuale adaptos ĝin. Sro Jaumotte tradukos en la franca lingvo.

La leteroj devas esti skribataj sur papero de BCKE. Sro Maertens zorgos por la presigo de tiu papero .

b. La senatora intergrupo de la intelektaj interesoj estos alskribita de Sro Sielens por altiri la atenton sur la lingva problemo kaj ĝia solvo per Esperanto. Sro Maertens faros kopiojn de la gazetartikolo en kiu oni anoncas la starigon de la jusmercita asocio.

c. Sro Van Gindertaelen proponas kunigi la financaj fortoj por inde festi la jubileon de LEMN, RBLE kaj Fl.L.E. per komuna eldono de tradukoj de tri valoraj tekstoj de nederlanda, valona kaj flandra verkisto. La du ligoj priparolos tiun proponon en la estraro.

d. Sro Jaumotte proponas ke Fl.L.E. esploru la eblecojn por kune festi la jubileon de RBLE kaj FLLE, en nia lando, ekster la komuna kongreso en Utrecht. Fl.L.E. pritraktos tiun proponon en venonta estrarkunsido.

e. Sro Maertens proponas por ke oni klopodu havigi fald-prospekton de la Internacia mondekspozicio en Bruselo 1958.

La protokola sekretario,

Maertens G.
Pr. Leopoldstr. 51
Sint Kruis.